



**PILO-PRESS** N-ro 46/76

Internacia 26 nov 1976

Informservo Aperas ĉiusemajne

Eldonanto/Herausgeber:

Ludwig Pickel

Postfach 2113

D-85 Nürnberg 1

Tel. (09 11) 46 36 49; 51 42 69

### Nova Bulteno de LOT en Esperanto

Varsovio (pp) - La Polaj Aer-Linioj LOT, kiu entrepreno de longa tempo utiligas Esperanton por informado apud la aliaj lingvoj, preparas nun sian novan bultenon ĝuste en Esperanto. La bulteno estos titolita "La historio de unu artafiŝo" kaj ĝin oni povos mendi ĉe: Polskie Linie Lotnicze LOT, Varsovio, str. Grójecka 17, Pollando.

La bulteno aperos en limigita eldonkvanto de 1000 ekzempleroj, tial oni pli frue antaŭmendu por si la eldonaĵon, ĉar unue ĝi estos sendita al la antaŭmendintoj. Tute senpage!

Valoras substreki, ke ĝi estos jam la kvara bulteno de LOT en Esperanto. LOT aperigis ankaŭ ĉ. 20 000 poŝtkartojn kun Esperanto-teksto kaj vortareton, en kiu Esperanto aperas apud 5 aliaj lingvoj (oni distribuis ĝin dum la Universala Kongreso en Beogrado). Fine estas substrekinda la fakto, ke unu el la aviadiloj de LOT, kiu flugas sur la eŭropaj trakoj, havas la nomon ZAMENHOF.

Kiel ni eksciis, en Esperanton tradukis la bultenon red. Andrzej Pettyn el Pola Radio.

Atenton! La Esperanto-gazetaro estas petata transpresi la sciigon pri la nova bulteno de LOT.

### Bapto kaj inaŭgura flugo

Zürich (pp) - Finfine post multegaj laboroj la grava momento alproksimiĝas!

La bapto kaj la inaŭgura flugo de la unua varmaera balono **ESPERANTO** en la mondo okazos la 18-an aŭ 19-an de decembro 1976, laŭ la vetera situacio. Telefono 180 donos informon.

La festo okazos en la loko "Guldenen", proksime de Forch apud Zürich.

13,00 horo: Kolektiĝo ĉe la restoracio "Guldenen".  
Salutado, bonvenigo kaj konciza informado.

13,40 horo: Preparo de la balono

14,00 horo: Baptado de la balono kaj fiksitaj supreniroj por la gastoj. (Se la vento ne estos tro forta)

15,00 horo: Starto al la inaŭgura flugo.

La organizantoj, la Esperanto-Societo Zürich kaj la Balonpiloto, esperas, ke multaj havu la okazon ĉeesti tiun unikan eventon, kiu sendube eniros la historion de Esperanto.

### Interlingvistiko en scienco kaj klerigo

Paderborn (pp) - Merkrede, la 24-an de novembro, komenciĝis la laborokonferenco "Interlingvistiko en scienco kaj klerigo" en la FEOLL-Instituto de Paderborn. Je la 16,30 horo la partoprenantoj havis okazon viziti la instruhoron en la avangarda klaso de la lingvo-orientiĝa instruado. La malferman prelegon faris prof. d-ro István Szerdahelyi, Budapeŝto, pri "La aktuala stato de interlingvistiko". La laborokonferenco daŭros ĝis la 28-a de novembro.

## Jerzy Grum pri sia prelegvojaĝo tra F R Germanio

Varsovio (pp) - Kiel ni jam antaŭanoncis, Jerzy Grum, dum la pasinta Esperanto-Ekspreso de Pola Radio, dividis siajn reflekciojn pri sia prelegvojaĝo tra F R Germanio, pri kiu ni jam raportis, kun la aŭskultantoj de Pola Radio.

Jerzy Grum diris: "Do, la unua rimarko: La vojaĝo estis ege rapida - ekspresa ni povas diri - ĉar du semajnoj kaj 13 urboj. Pro tio evidente la reflekcioj, miaj rimarkoj devas esti iom supraĵaj kaj pri la lando kaj pri la movado en Federacia Respubliko Germanio.

Evidente, se temas pri la unua afero, ĝi estas altgrade industriigita, bonstata lando kaj kun alta vivnivelo de la ordinara civitanotio ni ĉiuj scias, ĉu ne?

La movado estas iom forta kvankam mi pensis ke ĝi estas pli forta, tamen bone organizita. Eĉ se ni ne povas paroli pri multaj membroj dum miaj prelegoj, oni devas konstati, ke la organiza flanko de tiu ĉi movado estas altnivela. Mi mem tion spertis ĉar dum miaj 13 urboj, kiujn mi vizitis, okazis eĉ ne unu averio, en tiu turneo, ekspresa vojaĝo.

Mi pensas ke plej grava afero estas ke GEA faris tiun ĉi inviton al pola ĵurnalististo-esperantisto. Ĝi estis la unua prelegvojaĝo el serio de pliaj kiun tiu asocio planas; laŭ mia scio la sekva estas tiu de s-ino Madeleine Haudebine. Do la ideo mem estas tre bona kaj interesa kaj mi konsilus la aliajn asociojn imiti la germanan Esperanto-asocion.

Evidente por mi persone la plej interesa estis ke mi konstatis - ekster iu ajn dubo -, ke la germanaj esperantistoj en F R Germanio vere tre interesiĝas pri Pollando, pri la hodiaŭa stato de nia lando, pri la vivo tie, pri la homoj, kaj tiu ĉi interesiĝo ne limiĝas, kiel mi povis konstati, nur je niaj disaŭdiĝoj; la okcidentgermanaj esperantistoj serĉas Pollandon en sia televido, siaj kinejoj, en siaj muzikaj salonegoj ktp. La interesiĝo estis tre granda, kiel mi diris, kaj dum diskutoj kiuj ĉiam okazis post mia prelego oni starigis al mi plurajn demandojn pri la diversaj sferoj de la vivo en nia lando. Do, kompreneble niaj disaŭdiĝoj mem estis temo de pluraj demandoj kaj miaj respondoj.

Mi povas konstati kun plezuro ke mi estis vere gastame akceptita en ĉiu loko, kiun mi vizitis, kaj pluraj urboj kiuj ne povis gastigi min, tamen estis iel reprezentitaj, ekz. en Oberkirch venis samideanoj el Strasburgo, do el Francujo eĉ, pro la proksimeco de ĉi tiu urbo.

Mi pensas ke - kaj mi kredas tion -, ke mia vojaĝo iamaniere pligrandigis la jam ekzistantan grandan interesiĝon pri niaj programoj, instigis plurajn homojn provi - eĉ malgraŭ ne ĉiam bonaj aŭskulteblecoj - provi aŭskulti al niaj programoj, kaj tio ĉi certe - mi esperas, - respeguliĝos en pligrandiĝontaj korespondaĵoj, en plimultiĝontaj korespondaĵoj kiujn sendos la germanaj esperantistoj en F R Germanio al nia redakcio.

Finante tiun ĉi mallongajn reflekciojn mi volus ankoraŭfoje tre kore danki ĉiujn kiuj tiel gastame akceptis min en tiu ĉi lando."

### Reagoj de aŭskultantoj

Dum la Esperanto-Ekspreso oni povis aŭdi ankaŭ reagojn de kelkaj aŭskultantoj, kiuj ĉeestis la prelegon de Jerzy Grum.

Walter Poppeck, Oberkirch, skribis: "La vespero kun samideano Jerzy Grum bone pasis kaj ni atente aŭskultis lian paroladon. Resume mi povas certigi ke s-ano Jerzy Grum estis bonega ambasadoro de Pollando"

S-ino Elfriede Kruse, ĝenerala sekretario de IFEF, opiniis: "La vespero en Frankfurt estis tre instrua por niaj membroj. Mi esperas, ke ĝi malfermis pardonon kiu ebligas vastajn kontaktojn inter niaj popoloj."

Kaj s-ro F. Caragea, Frankfurt, i.a. komentas: "...Mi sentas la emon esprimi al vi mian apartan ĝojon kaj plezuron pri tiu ĉi renkontiĝo kiu sendube trovas sampozitivajn intereson kaj eĥon inter la tuta ĉeestantaro. Laŭ mia opinio ĝi estis tre bonvena kaj utila laŭ ĉiuj vidpunktoj. Tio multe kontribuis al pli bona interkompreniĝo."

\*\*\*\*\*

### Zamenhof-Festoj

#### Mannheim-Ludwigshafen

La Esperanto-Amikoj de Mannheim-Ludwigshafen (T 6, 18; D-6800 Mannheim 1) festos la ĉi-jaran Zamenhof-Tagon samtempe kun la 70-jara jubileo de la grupo la 4-an de decembro, 15-a horo, en Carl-Duisberg-Gesellschaft, Tattersallstr. 39, Mannheim (proksime de Wasserturm). Okazos preleĝoj de Richard Reuchlin pri "Esperanto en Mannheim 1906 - 1976" kaj de Reinhard Haupenthal pri "La signifo kaj rolo de la Zamenhofa verkaro". Funkcios la libroservo de Sarlanda Esperanto-Ligo.

#### Hamburg

La Zamenhof-Festo en Hamburg okazos la 11-an de decembro, je la 16-a horo en la klubejo Vehrenkampstr. 15-17, Hamburg-Langenhfelde. Festpreleĝoj Fritz Karow, Köln, pri "Louis Braille kaj Zamenhof rilate al la blinduloj".

#### Vieno

La Aŭstria Esperantista Federacio, la Societo por Internacia Kontakto - Esperanto-Amikoj kaj la Pola Instituto de Vieno invitas al la Zamenhof-Festo (Tago de la Esperanto-Libro) la 18-an de decembro, je la 17-a horo en la Pola Instituto, Am Gestade 7, angule de Tiefer Graben, Wien. Festparolos prof. d-ro Karl Beckmann, prezidanto de AEF. Skeĉon kaj kantojn en Esperanto prezentos la Esperanto-lernantoj de la ĉeflernejo Vieno XXI, Kinzerplatz, sub gvido de Sprachoberlehrerin Ingrid Plazotta. Salutos Ambasada Konsilisto mag. Jerzi Passendorfer, direktoro de la Pola Instituto.

#### Pilo-Eldonaĵoj 1977

Ankaŭ dum 1977 aperos Eŭropa Esperanto-Revuo, Pilo-Press kaj END (la germanlingva informservo Esperanto-Nachrichten-Dienst).

Ĉiuj tri eldonaĵoj kune kostas 50,-- GM

Pilo-Press kaj END kune kostas 40,-- GM

Kompreneble oni povas ankaŭ aboni la publikaĵojn unuope. La jara abonkotiĝo estas:

Eŭropa Esperanto-Revuo	16,-- GM
Pilo-Press	30,-- GM
END	15,-- GM

Mendojn oni sendu al Ludwig Pickel, Postfach 2113, D-8500 Nürnberg 1  
Poŝtĉekkonto Nürnberg 819 56-851, Stadtparkasse Nürnberg 1.901.579  
Österreichische Länderbank, Bregenz 880.110.899/01  
Schweizerische Volksbank St. Gallen KK 629 240

Abonu nun!

## Konkurso de Pola Radio

10-tagaĵ ekskursoj tra Pollando

Valoraj objektaĵ premioj

estas akireblaj de niaĵ aŭskultantoj kaj legantoj, kiuj donos respondojn al jenaj demandoj:

- 1) Kiujn polajn artikolojn oni povas aĉeti en via lando kaj kiel vi pritaksas ilin? Kiuj polaj artikoloj (produktoj) ĝuus tie sukceson?
- 2) Kiel vi vidas la perspektivojn de la plua evoluo de la kunlaboro de via lando kun Pollando? Kio, laŭ via opinio, influis aŭ povus kontribui al plivastigo de tiu ĉi kunlaboro?
- 3) Kiel vi pritaksas la servan agadon de polaj transportaj entreprenoj (Polaj Aer-Linioj "LOT", Polaj Oceanaj Linioj, Internacia Aŭtomobila Transportado "PEKAES", Polaj Stataj Fervojoj) kaj de la Turisma Oficejo "ORBIS"?

Respondo jam al unu el la supraj demandoj rajtigas al partopreno en lotado de la premioj.

La leterojn ni petas sendi laŭ la adreso:

Pola Radio, Esperanto-Redakcio, PL-00-950 Warszawa 1,

Poŝtkesto 46, Pollando - en kovertoj signitaj per la devizo: "Konkurso", ĝis la 31-a de decembro en la 1976-a jaro (decidas la dato de la poŝta stampo).

La rezultojn ni anoncas en la disaŭdigoj de la Pola Radio por Eksterlando la 31-an de januaro en la 1977-a jaro kaj en la marta numero de la monatrevo "Polska" (Pollando).

La ekskurso de la laŭreatoj de la ĉefaj premioj okazos en periodo indikota de la organizantoj de la konkurso.

Ni deziras bonŝancon en la lotumado de la premioj.

Partoprenu la konkurson mem kaj partoprenigu aliajn!

Polskie Radio Warszawa

Pola Radio disaŭdigas trifoje ĉiutage en Esperanto:

6,00 horo	ondolongoj: 41 m, 49 m, 75 m, 200 m
16,30 horo	ondolongoj: 25 m, 31 m, 41 m
22,30 horo	ondolongoj: 41 m, 49 m, 75 m, 200 m